

Hector Hodler, 6-a parto : Unua numero de la gazeto *Esperanto*
Claude Gacond, 349-a radioprelego, 1970.06.17 & 20

Cl.- Parolas gesinjoroj Claude kaj Andrée Gacond.

Dum kelkaj monatoj ni turnos nian atenton al la vivo, penso kaj verkaro de Hector Hodler, unu el niaj valoraj verkistoj.

A.- La unua numero de la gazeto *Esperanto* redaktita de Hector Hodler aperis je la 12-a de februaro 1907. Ĝi havis la formaton de la nuna *Heroldo de Esperanto* kaj aperis duonmonate.

Cl.- En 1907 esperanto eniris sian dudekan jaraĝon kaj la gazeto *Esperanto* vere konkretigas tiun ekmaturiĝon.

A.- En front-artikolo Hector Hodler anoncas sian programon. Ni nun legos erojn el tiu teksto titolita *Al nia legantaro*, kaj vi konstatos, ke tiu juna redaktoro, kiu ankaŭ eniris sian dudekan jaraĝon, havis tre klaran komprenon pri la fenomeno lingvo internacia ĝenerale kaj pri la tiama situacio de esperanto mem. Tiu teksto konservis sian aktualecon, ĉar el tiu programo ne ankoraŭ ĉio efektiviĝis. Jen kion diras Hector Hodler :

Cl.- « *La gazeto ESPERANTO hodiaŭ reaperas, starigita sur tute nova fundamento kaj gvidata de nova direkcio. Naskita antaŭ tri jaroj, en la momento kiam ekmontriĝis la rezultatoj de multjara, senlaca propagando, ĝi de tiu tempo travivis diversajn periodojn. Simila al tiuj estaĵoj, kiuj ĉe l' veno de l' ekmaturiĝo, nescias kien ilin kondukos la jaroj, ĝi iam ŝajnis ŝanceliĝema kaj necerta pri sia vojo. Dufoje ĝin morto minacis, ne tial ke al ĝi mankis helpantoj kaj amikoj, sed nur tial ke ĝian regulan aperon haltigadis pure administraj aferoj. Nuntempe malaperis tiaj cirkonstancoj, kaj al la tutmonda esperantistaro, ne plu al ia nacia esperantistaro, sin prezentas la gazeto ESPERANTO, provita, hardita, kun programo, alfarita al la estantaj bezonoj kaj disvastiĝeco de nia afero.* »

A.- Hector Hodler volis krei vere internacian gazeton, sed en 1907 li subtaksis la financajn malfacilaĵojn. Jaron post jaro li luktos kontraŭ ĉefe monaj problemoj. La diseco de la esperantistoj ne nur komplikigas la verajn kontaktojn, sed antaŭ ĉio plikostigas ĉiun agadon. Jen kiel Hector Hodler priskribas la evoluon de la lingvo esperanto :

Cl.- « *Jam diversajn aĝojn travivis esperantismo. Dum longaj jaroj, la lingvo restis en provado ; pri ĝi nur kelke da homoj sciis, sed, dume, senbrua, nekonata, tamen necesega laboro interne efektiviĝis ; literaturaĵoj, ĉiaspecaj verkaĵoj kreis en ĝi vivon kaj propran spiriton, ĝin riĉigadis per tradukado kaj verkado. Tiel, Esperanto, kiu estis teorie bona kaj taŭga, fariĝis por la literatura praktikado vere vivanta lingvo ekzistanta per si mem ekster la aliaj lingvoj. Sed la uzantoj de tiu mirinda interkomprenilo baldaŭ komprenis la necesecon ĝin diskonigi ĉe la aliajn homojn. Tian malfacilegan taskon entreprenis kelkaj kuraĝuloj : oni scias kiel rapide, nur per siaj propraj fortoj, ili sukcesis venki la ŝajne nerenverseblajn barojn, kiujn starigis skeptikeco kaj malkonfido. En ĉiuj landoj, jaron post jaro, plivastiĝis la armeo de la novaj varbitoj, kaj samtempe pligrandiĝis la praktika uzado de la lingvo. Du kongresoj, sennombraj korespondaĵoj, ĉiaspecaj pruvoj, montris, ke oni povas jam nun utile uzi Esperanton. Ni ne nur devas propagandi la lingvon, sed ankaŭ ĝin uzi kaj per ĉiuj manieroj akceli ĝian enkondukon kaj aplikadon en la diversaj fakoj de l' homa penso.* »

A.- Ne ĉiuj samtempuloj tiel klare vidis la situacion. Ni nur pensu al Louis de Beaufront, la tiama gvidanto de la franca movado, kiu la saman jaron proponis novan lingvo-projekton sub la nomo Ido, kredante, ke la esperantistoj lin sekvos. Sammomente Hector Hodler montris, ke la estonteco apartenos al ni, se ni konsideras esperanton ne kiel celon, sed kiel perilon :

Cl.- « *La dua kongreso de Esperanto signis tute novan vojon en la disvastiĝado de Esperanto tra la mondo. Ĝi klare montris, ke flanke de la lokaj aŭ naciaj nur propagandaj organizaĵoj*

kreiĝas, iom-post-iom, internacia societaro, fondita laŭ la komuna intereso kaj celo de samfakaj personoj, kiuj konsideras Esperanton kiel perilon, ne kiel celon. Komercistoj, juristoj, sciencistoj, aŭ en alia vidpunkto samreligianoj kaj sampartianoj kuniĝis internacie kaj decidis tuj uzi Esperanton por siaj tutmondaj rilatoj. Aliparte decidante pri la kreado de konsuloj, la lasta kongreso kuraĝigis ĉiujn samideanojn praktike uzadi Esperanton. En tiu kampo estas la estonteco kaj sukcesebleco de nia lingvo. »

A.- Kaj nun Hector Hodler jam iomete priskribas siajn organizajn projektojn :

Cl.- *« La propagandaj societoj jam havas siajn proprajn organojn, kies celo estas klare difinita ; aliaj revuoj kreiĝis por specialaj fakoj kaj do celas la tujan uzon de Esperanto. Sed la nombro de tiuj lastaj revuoj estas nun tre malgranda, ĉar la peresperantaj societoj ne povas pro la malmulteco de siaj anoj fari la elspezojn necesajn por la kreo de speciala organo, kiu ne interesus sufiĉe da samfakanoj por vivi per si mem. Aliflanke, la oficoj, konsuloj, kaj similaj entreprenoj, ĵus kreitaj aŭ tuj kreotaj, ne havas difinitan komunan gazeton por elmeti siajn sciigojn kaj sekve ne povas oportune interrilati. Mankas do en la nuna tempo, praktika, malkara, regula ĵurnalo, kiu estos la komuna ligilo inter la supre nomitaj entreprenoj, internacie redaktita tutmonda informilo, kiu, dank'al sia enhavo, montros la jaman utilecon kaj disvastiĝecon de Esperanto. »*

A.- Jen diroj ankoraŭ aktualaj, ĉu ne ? Hector Hodler deziris redakti ne propagandan gazeton, sed esence internacian praktikan gazeton :

Cl.- *« La nun aperanta ESPERANTO [...] estos esence internacia praktika gazeto ; ĝi estos la organo de ĉiuj entreprenoj, kiuj konsideras Esperanton ne kiel celon, sed kiel perilon ; sekve ĝi neniel enmiksiĝos en la vivadon de la pure propagandaj grupoj, sed kunhelpos al ilia agado per alia vojo. »*

A.- Sekvas detala listo de la agadoj, kiujn tiu gazeto *Esperanto* faciligos : ĝi faciligos la komunikojn inter la konsuloj, publikigos ilian nomaron, helpos la hotelistojn kaj komercistojn per aperigo de anoncoj, donos informojn pri la okazintaĵoj en ĉiuj landoj kaj pri difinitaj temoj, organizos enketojn, pritraktos la ĉefajn demandojn pri nia movado. Pri la lingvaj diskutoj Hector Hodler diras :

Cl.- *« Ni konsideras ĉian disputon pri la jam ekzistanta afero en la lingvo kiel superflua kaj malutila ; nia lingvo vivas kiel idiomato ajn, sekve ĝi ne estas perforte tuŝebla. »*

A.- Hector Hodler konsciis, ke tio estis vasta kaj malfacile realigebla programo :

Cl.- *« Kompreneble, la supra programo estas tre vasta kaj postulas longan tempon antaŭ ol alveni al plena realigiteco. »*

A.- La venontan semajnon ni ĵetos rigardon al aliaj artikoloj de tiu unua numero de la gazeto *Esperanto*.

Cl.- Vi aŭdis prelegon el Svislando. Parolis gesinjoroj Claude kaj Andrée Gacond. Ĝis reaŭdo !

-oOo-